# Ĉinio, homaj rajtoj kaj la Esperanto-movado

## Pekino fajfas pri homaj rajtoj tiel longe ke la ekonomio prosperas kaj la komunisma partio regas kaj neeviteble riskas gravan konflikton kun la Okcidento

*Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli (Svislando)*

Paroli pri homaj rajtoj kun okcidentaj ŝtatoj Ĉinio jam de longe ne plu emas. La homrajtan dialogon kun Germanio Pekino ĉi-jare denove nuligis. La ĉinoj klarigis, ke mankas konstrua etoso dum la interparolado (sic). Pro tio Ĉinio lanĉis proprajn konferencojn. Okaze de la 2019-jara Internacia Tago de la Homaj Rajtoj Ĉinio invitis al kunveno en Ŝanhajo. Dum tiaj aranĝoj, en kiuj Ĉinio rigore propagandas la propran interpreton de la homaj rajtoj, la eŭropanoj konatiĝas kun la aktuala tono de Pekino. En tiuj okazoj la ĉinoj prezentas konfuzajn konceptojn kun alternativaj faktoj, emfazante la rapidan ekonomian evoluon kiel pretekston por la lezoj de la homaj rajtoj, kvazaŭ por senkulpigi la malrespektadon de la rajtoj de siaj civitanoj. Estas klare, ke oni celas diskrediti la okcidentan komprenon pri la homaj rajtoj por limigi aŭ eĉ tute eviti la okcidentan spiritan kaj politikan influon en Ĉinio, kiu pli kaj pli sentas sin supera al la cetera mondo.

Post la honorigo de la renoma ujgura sciencisto Ilham Tohti[1] per la Saĥarova premio fare de la EU-Parlamento, kio estis konsiderata de Pekino kiel kruda provoko, eksplodis la kolero de la ministro pri eksteraj aferoj de Ĉinio, kiu klarigis al la eŭropanoj, ke Ĉinio mem laboras por la feliĉigo de la popolo kaj ne bezonas alilandajn instruojn aŭ konsilojn.

Ĝis antaŭ jardeko eblis ankoraŭ impresi la ĉinan registaron por postuli de ĝi, ke ĝi pli bone traktu migrantojn, etnajn minoritatojn kaj politikajn disidentojn kaj opoziciulojn. Depost kiam Xi Jinping fariĝis nova ĝenerala sekretario de la ĉina Komunisma Partio, estro de la Centra Armea Komisiono kaj prezidento de la ŝtato,[2] la traktado de tiuj grupoj fariĝis pli kruda kaj maltolerema.

Pekino ŝatas nomi la Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj de UN rezulto de „okcidentaj valoroj", al kiuj Ĉinio neniam havis la okazon kontribui, sekve la ĉinoj do ne sentas sin koncernataj de ĝi. Kiam la Deklaracio estis adoptita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en Parizo la 10an de decembro 1948, la Popola Respubliko fakte ankoraŭ ne estis fondita. En Ĉinio kaj komunistoj kaj naciistoj batalis por la politika potenco. Malgraŭ tio, la oficanta ĉina registaro en Nankino sendis reprezentantojn al Parizo. Dum landoj kiel Germanio, Italio kaj Sovetunio estis regataj de diktatoraj reĝimoj, la tiama Ĉinio apartenis al la pli progresemaj ŝtatoj, antaŭ ol fali en la komunisman inferon. La estro de la ĉina delegacio eĉ asertis, ke li kunlaboris al ĉiu paragrafo de la deklaracio. Pri tio Pekino ne emas memori, male, ĝi eĉ preferas forgesi ĉi tiun historian ĉapitron, same la faktON, ke en la tempo de Mao Zedong pereis 60-80 milionoj da homoj pro la sekvoj de la komunisma teroro.

70 jarojn post la proklamo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj Ĉinio do klare pridubas la validecon de la principoj esprimitaj en tiu deklaracio por la propra teritorio kaj preferas mem difini la normojn de la rajtoj de sia popolo. En interna dokumento de la komunisma partio de la jaro 2013 la ĉina registaro eĉ nomis la disvastigon de la universalaj homaj rajtoj kaj la kritikon pri la propraj homrajtaj lezoj kiel danĝerojn.[3]

Lastatempe atingis la eksteran mondon informoj pri novaj grandstilaj lezoj de la homaj rajtoj en Ĉinio sur pluraj kampoj. Inter ili plej draste elstaras la daŭra subpremado de la *tibeta* popolo. Ĉar Pekino ne plu permesas al eksterlandanoj viziti Tibeton, kiuj povus raporti pri la aktuala situacio en tiu lando, la ekstera mondo ne vere scias, kio okazas en ĝi. Ankaŭ la *mongoloj* kaj aliaj minoritatoj de Ĉinio estas koncernataj de etnocido. Plej aktuala fenomeno estas la ampleksaj subpremado kaj persekutado de la *ujgura* popolo en la provinco Sinkiango, kiu estas minacata de simila peripetio kiel la tibetanoj. Laŭ internaciaj observantoj

---

[1] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ilham_Tohti.
[2] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Xi_Jinping.
[3] Laŭ https://www.derbund.ch/articles/ausland/asien-und-ozeanien/pekings-plan-gegen-die-menschenrechte/story/19232275.

kaj bone informataj anoj de tiu minoritato ujguroj estas amase sendataj al prizonecaj koncentrejoj, kie oni klopodas senigi ilin de siaj islamaj radikoj kaj celas reedukadi kaj ĉinigi ilin en la senco de la pekinaj komunistoj. Pekino parolas pri „pliklerigaj" centroj kaj suspektas la ujgurojn pro terorismo. Laŭ certaj fontoj, ĉirkaŭ unu miliono da ujguroj troviĝas en tiaj koncentrejoj. Satelitaj bildoj montris malaperigitajn ujgurajn kulturajn monumentojn, ekzemple moskeojn kaj tombejojn, kiuj evidente estis detruitaj laŭ ordono de la centraj aŭtoritatoj.[4] Pri tiuj faroj la ĉina gazetaro nature ne raportas, aŭ en tordita maniero. Do, estas evidente, ke antaŭ la okuloj de la monda publiko okazas nova genocido en Ĉinio, kontraŭ kiu protestas nur malmultaj. Sed tio ne estas ĉio. La moderna teknologio donas ankaŭ bonvenajn okazojn por pli forte prispionadi, kontroli kaj subpremi la propran popolon. En la tuta lando estis instalitaj milionoj da kameraoj, kiuj estas ekipataj per speciala vizaĝ-rekona softvaro kaj kiuj senĉese filmas la movojn, agojn kaj vojojn de la civitanoj por kolekti informojn pri ilia konduto. Se ili bone kondutas en la ĉiutaga vivo kaj respektas la volon la oficiala politiko, ili profitos pli da okazoj por plibonigi sian vivon; se ilia konduto estas misa kaj ne konformas al la normoj diktitaj de la ŝtato kaj partio, ili riskas perdi punktojn kadre de iu nova „socia kredit-sistemo" kaj per tio avantaĝojn, rajtojn kaj eblecojn, kio limigas ilian privatan vivon aŭ profesian karieron.  Dum la produktistoj de tiu softvaro akcentas la plusojn de la nova teknologio, kiu devus plialtigi la sekurecon de la ĉinoj en sia ĉiutaga vivo, la kritikantoj avertas, ke la vizioj, kiuj estis priskribitaj de la aŭtoro George Orwell en la romano „1984", povus plene efektiviĝi per ĝia aplikado.[5]

Ĉinio estas lando, kie komplete mankas gazetara kaj publica libereco, kie la ŝtato ĉikanas, persekutas kaj malliberigas ĵurnalistojn, verkistojn, artistojn kaj aliajn intelektulojn, kiuj kritike rilatas al la oficialaj politiko aŭ historio de la komunisma reĝimo kiel ekzemple Jung Ĉang, aŭtorino de grandioza kritika biografio pri Mao Zedong, kiu ne povas aperi en Ĉinio, [6] aŭ la konata ĉina artisto Ai Weiwei,[7] kiu mem estas la filo de fama ĉina poeto, kiu sidis en prizono dum dudek jaroj pro kritikado de la komunisma reĝimo. En Ĉinio, kiu krude blokas la liberan interŝanĝon de informoj, la internacia interreto, precipe la grandaj sociaj mediumoj, estas nealireblaj kaj anstataŭigitaj per interna ĉina reto, kiu estas rigore cenzurata kaj purigata de malkonvenaj eksteraj enhavoj.[8] Ankaŭ bildoj, kiujn ĉinoj mem publikigas en la sociaj retoj, estas senprokraste forviŝitaj de la cenzuro. Ĉiuj tiuj fenomenoj nature akre kontraŭas la normojn kaj principojn de la libera kaj demokratia „jura ŝtato", kiun la bravaj civitanoj de Honkongo dume klopodas savi per daŭra protestado. En la Popola Respubliko multaj homoj ŝajnas rilati indiferente al tiuj problemoj, ĉar neniu el ili protestas, aŭ kuraĝas protesti, kiel en Honkongo, aŭ en Ruslando. La konstantaj manifestacioj de Honkongo estas prisilentataj en Ĉinio kaj la problemoj false prezentataj. Ankaŭ Tajvano defendas sin kontraŭ la agresema propaganda subfosado el Ĉinio, kiu volas „rehejmigi" la insulon, ĉar el la vidpukto de Pekno Tajvano estas apostata provinco. En Okcidento la aktuala politika sistemo de Tajvano estas konsiderata kiel modelo por la demokratiigo de la Popola Respubliko. La civitanoj de Ĉinio preferas fermi la buŝon, se temas pri politikaj diskutoj, kaj eluzi la novajn „personajn liberecojn",  kiujn la ŝtato donas, ekzemple vojaĝi kiel turistoj al Eŭropo (aŭ Tajvano) aŭ eĉ labori tie, kio povas konduki al definitiva elmigrado. Pro manko de lingvaj konoj kaj komplete fremda kulturo, tiuj elmigrintoj apenaŭ integriĝas en la lokajn sociojn, kio cetere koncernas ankaŭ milionojn da turkoj, araboj kaj afrikanoj, kiuj vivas en la eŭropaj landoj, kie ili formas „paralelajn sociojn". En Okcidento oni pli kaj pli kaj maltrankviliĝas pri tiu evoluo, ankaŭ pro la turismaj svarmoj el Ĉinio, sub kiuj suferas la loĝantoj de certaj urboj kaj regionoj, kaj pri ĉinaj aĉetoj de la okcidenta infrastrukturo, ekzemple havenoj en Italio kaj Grekio, aŭ stacidomoj kaj minejoj en Afriko. En suda Italio ĉinoj kunlaboras kun la mafio, kiu akceptas varojn el Ĉinio por distribui ilin en Eŭropo. Tiel, la ĉina influo kreskas ĉie en la mondo pli kaj pli. Pekino konscias pri tiu sukcesa strategio kaj alergie reagas al ajna kritiko de ekstere, kiun ĝi rifuzas kiel enmiksiĝon en la internajn aferojn de Ĉinio.

Bedaŭrinde, Ĉinio estas bone akompanata de multaj „kanajlaj" ŝtatoj de la mondo, en kiuj la situacio de la homaj rajtoj, de la gazetara libereco kaj de la demokratio krizas aŭ estas en danĝero. Diversaj altgrade pro-blemaj islamaj ŝtatoj kiel Egiptio, Saŭdarabio kaj Pakistano eĉ ne mallaŭdas Ĉinion pro la

[4] Vd. https://www.businessinsider.de/politik/china-zerstoert-systematisch-moscheen-der-uigurischen-minderheit-2019-4; https://www.sueddeutsche.de/politik/china-und-die-uiguren-wo-die-moscheen-verschwinden-1.4407686; https://de.euronews.com/2019/10/09/vom-friedhof-zum-happiness-park-uiguren-bleiben-auf-der-strecke.
[5] Vd. https://www.stern.de/digital/technik/china-plant-die-totalueberwachung-mit-600-millionen-kameras-7945414.html; https://www.tagesschau.de/ausland/ueberwachung-china-101.html.
[6] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Jung_Chang.
[7] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ai_Weiwei. Cetere estas karakterize, ke pri tiuj ĉinaj disidentoj mankas ajna vikipedia artikolo en Esperanto.
[8] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Internet_in_China.

subpremado de la ujguraj fratoj. Sed ankaŭ multaj aliaj ŝtatoj, kiuj mem havas dubindan homrajtan bilancon, subtenas Ĉinion. Sur la kampo de la retoriko Pekino jam delonge atingis sian celon, kun bizaraj rezultoj. En la homrajta konsilio de UN ekzistis en 2018 pli da registaroj, kiuj gratulis Ĉinion, kiam oni ekzamenis la homrajtan situacion en tiu lando, ol tiaj, kiuj mallaŭdis ĝin. Kiam Germanio kaj 22 aliaj ŝtatoj kritikis Ĉinion pro la situacio en Sinkiango, pli ol 50 ŝtatoj respondis per laŭdado de la „homrajtaj atingoj" de Ĉinio.

Alia fakto estas, ke preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo ekster la Okcidento kaj eĉ en la Okcidento mem havas pli malpli gravajn problemojn kun homaj rajtoj kaj gazetaraj liberecoj. Ĉinio estas tamen aparte drasta kazo. Tiu lando okupas – kune kun Irano, Sirio, Belarusio, Sudano, Kubo, Afganio, Arabaj Emiratoj, Libio, Vjetnamio, Norda Koreio k.a. – la plej lastajn poziciojn en la ĉi-rilataj indeksoj kaj statistikoj de internaciaj neregistaraj organizaĵoj, kiuj observas tiujn problemojn.[9] Por silentigi la kritikis-tojn, Pekino subfosas la internaciajn instancojn per ruzaj metodoj – inter alie per mono, da kiu ĝi posedas abunde por „investi" en „utilajn" projektojn. Tiucele, Pekino altigis ekde 2012 sian eksterpolitikan budĝeton pli ol duoble. Per ĉirkaŭ dek procentoj en la budĝeto Ĉinio estas la dua plej granda monpaganto de UN post Usono. Ŝajnas, ke la ĉinaj komunistoj bone lernis la koncernan lecionon de la okcidentaj kapitalistoj: Kiu pagas, tiu ordonas, aŭ almenaŭ influas la aferojn, ekzemple la budĝeton de la homrajta komisiono. Krom tio, Pekino aktivas en la komitato pri akreditado ĉe UN por zorgi pri tio, ke plendemaj neregistaraj organizaĵoj malhavu la rajton interveni. Sub tiaj kondiĉoj organizaĵoj, kiuj kritikas Ĉinion, preskaŭ ne plu ricevas la eblon akreditiĝi dum plenkunsidoj de UN. Paralele, Pekino aktive agadas en la politika propagando kaj zorgas pri tio, ke la politikaj sloganoj de Pekino eniru en la frazaron de oficialaj UN-rezolucioj. La ĉinaj ambasadejoj en eksterlando havas la taskon eluzi ĉiujn eblojn por ofensive diskonigi siajn ideojn en la nacilingva gazetaro en formo de opiniaj kolumnoj kaj turismaj reklamoj, en kiuj Ĉinio estas adorata kiel „modelo por la homaro".[10]

Kiel menciite, la kritikantoj de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj proklamita en 1948 asertas, ke tiu dokumento estis ellaborita sur la bazo de kristanaj valoroj, kiuj neglektas valorojn validajn ekster la okcidenta sfero kaj do estas nenio alia ol instrumento de ĝia „kulturimperiismo". Al la „individuismo" de Eŭropo kaj Nordameriko oni kontraŭstarigas la „kolektivismon" de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Krom tio ili emfazas, ke la individuo havas ne nur rajtojn, sed ankaŭ devojn rilate al la familio, socio kaj ŝtato. En islamaj landoj oni akceptas la liberecon de la opinio nur, se ĝi ne kontraŭdiras la ŝarion. Ktp. Oni povas havi komprenon por tiaj argumentoj kaj eĉ konsenti, ke la Universala Deklaracio, kiu sendube estas produkto de la okcidenta racio, bezonas ian reformon aŭ kompletigon ĝpor konformi al la ideoj de neeŭropanoj. Tamen, la ŝario aŭ la ideoj de ĉinaj komunistoj por kontroli kaj subpremi la socion devus havi nenian lokon en moderna proklamo de la homaj rajtoj, ĉar tiaj reakciaj mezepokecaj doktrinoj malhelpus la evoluon de la homa civilizo. Aperas la impreso, eĉ la suspekto, ke diktatoraj ŝtatoj, kies socipolitikaj konceptoj baziĝas sur konservativaj dogmoj, provas intence uzi tiajn argumentojn por pravigi siajn hegemoniajn kaj monopolismajn celojn por gardi la potencon de unuopaj grupoj kaj elitoj en la politiko, ekonomio, socio kaj kulturo. Se la Libera Mondo volas resti lojala kaj principa al siaj origine proklamitaj ideoj kaj ce-loj, ĝi ne povas toleri tian sintenon kaj devas klare esprimi siajn ĉi-rilatajn vidpunktojn, cetere ankaŭ en la *Unesko-Kuriero* (pri kiu ankoraŭ temos ĉi-sube).

La historio do ŝajnas ripetiĝi sub iom aliaj cirkonstancoj kaj premisoj, kaj en alia epoko, kaj ankaŭ ripetiĝas la batalo aŭ lukto por la homaj rajtoj, kiuj daŭre estas subpremataj en plimulto de landoj, eĉ en iuj modernaj kaj liberaj. Alia termino estas diskriminacio, pro kiu suferas preskaŭ ĉiuj *indiĝenaj* popoloj de la mondo.[11] Ai Wei-wei konstatas kun konsterno, ke malgraŭ la rapida progreso de la scienco kaj tekniko en la tempo de la globaliĝo, okazas regreso ĉe la homaj rajtoj kaj libereco de la esprimado kaj ĉe la homeco ĝenerale. En la kazo de Ĉinio, kie homoj, kiuj volas liberecon, estas severe punitaj, iusence ripetiĝas la siatempa peripetio kun Sovetunio, kiu fajfis pri universalaj homaj rajtoj, kiujn ĝi konsideris altruditaj de la Okcidento, kaj klopodis subfosi la liberan mondon per plej fiaj kaj perfidaj artifikoj, dum sian influsferon ĝi traktis kiel tendaron de ostaĝoj kaj sklavoj. Sed la trukoj de Ĉinio estas multe pli subtilaj, ruzaj kaj inteligentaj. Pro tio Ĉinio devas esti konsiderata kiel granda problemo de la homaro, ankaŭ pro aliaj kialoj (ekologio, demografio, armado, turismo, ekonomia spionado, produktado kaj vendado de falsitaj varoj, ktp.).

[9] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Rangliste_der_Pressefreiheit kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Demokratieindex.
[10] Tiel okazis ekzemple en la gazetaro de Centra Svislando en decembro 2019 (vd. https://www.derbund.ch/schweiz/standard/chinesische-propaganda-ueberschwemmt-die-zentralschweiz/story/17607280).
[11] Vd. http://plansprachen.ch/Jaro_indigenaj_lingvoj.pdf.

Ŝajnas, ke Ĉinio dume ne kapablas trakti ĉiujn tiujn problemojn kaj evoluojn por trovi taŭgajn solvojn, kvankam ĝi estas potenca lando. En sia plej lasta kunsido la NATO-ŝtatoj pritaksis Ĉinion kiel „ŝancon kaj defion“, precipe el armea vidpunkto, sen konkretigi la unuopajn detalojn. Tio ne signifas, ke la resto de la mondo devas konsideri Ĉinion malamiko, sed oni ankaŭ ne devas resti naiva. La mondo, kiu ekonomie (jam delonge) plene dependas de Ĉinio, ĉiukaze troviĝas en grava dilemo, de kiu ĝi ŝajne ne plu kapablas liberiĝi, ĉar kun Ĉinio oni volas havi bonajn rilatojn kaj utiligi la avantaĝojn, kiujn ĝi provizas. Ai Weiwei estas konvinkita, ke la Okcidento estas kontenta pri Ĉinio, tiel longe ke ĝi estas regata de la komunistoj, kiuj funkciigas la senĉesan produktomaŝinojn en sia lando.[12]

## Esperanto-movado kaj la *Unesko-Kuriero*

Kiel konate, ekde la komencoj Esperanto ĝuas ian popularecon en Ĉinio, kie la maoisma partio apogis ĉi tiujn lingvon kaj movadon.[13] Pro tio la Esperanto-movado konsideras Ĉinion „bastiono“ de Esperanto kaj ne ĉesis pozitive rilati al tiu lando kaj finfine ankaŭ al ĝia registaro. La oficiala Esperanto-movado, kiu mem estis fervora aliancano de la komunismaj reĝimoj, neniam ĝis nun kritikis la mizeran staton de la homaj rajtoj en Ĉinio en iu ajn tempo aŭ formo. La alia flanko de la ora medalo estas, ke ekster la komunismaj strukturoj ne eblis aktivi por Esperanto en Ĉinio, kio havis fatalajn sekvojn por la libera Esperanto-agado en tiu lando. La saman problemon oni konas ankaŭ de aliaj landoj kiel Kubo, Vjetnamio, Sovetunio aŭ Irano. Por eviti persekutadon de esperantistoj kaj subpremadon de la Esperanto-movado en tiuj landoj la Esperanto-movado argumentas, ke kritikado de la diktatoraj reĝimoj malutilus al la propagando de Esperanto en la koncernataj landoj. Pro tio oni kutime rezignis kritiki la subpremadon de la homaj rajtoj kaj probable opiniis, ke formala referencado al la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj de 1948 en oficialaj artikoloj kaj paroladoj kaj la ekzisto de paragrafo pri la respektado de la homaj rajtoj en la asociaj statutoj sufiĉas por emfazi la gravecon de tiu temo. Neniu alia organizo ol la Esperanto-movado tiel lerte majstras tiun ambiguan duoblan rolon – ĝis hodiaŭ. Estus bone, se la Esperanto-movado ŝanĝus tiun cinikan sintenon, se ĝi volus konservi sian kredindecon, ĉar la tempoj ŝanĝiĝis, malgraŭ daŭra pluekzistado de diktatoraj reĝimoj. Ankaŭ la Esperanto-movado estus bone konsilata firme apogi la demokratiajn kaj liberajn kulturojn kaj fortojn anstataŭ doni la preferon al reakciaj diktaturoj.

Antaŭ nelonge la Esperanto-gazetaro sciigis, ke la esperanta eldono de la *Unesko-Kuriero* estis, post komenca privata iniciato de iu ĉina esperantisto nomata „Trezoro“, kiu mem financis, eldonis kaj dume ĉefredaktas tiun Esperanto-eldonon,[14] akaparita de la ŝtata novaĵ-agentejo *„El Popola Ĉinio“* en Pekino.[15] Oni ankaŭ anoncis, ke la ĉina registaro disponigas la necesan financadon de la Esperanto-eldono. UEA, malnova komplico de komunismaj reĝimoj kaj partnero de Unesko, kiu mem estas subfosata de kontraŭokcidentaj tendencoj, ludas la rolon de kuneldonanto. Kiel konate, la revuo *„El Popola Ĉinio“* servis dum jardekoj kiel organo de la rozkolora ĉina komunisma propagando. Nuntempe ĝi funkcias kiel „moderna“ novaĵ-agentejo de la pekina reĝimo, ĉar alia posedanto ne estas imagebla. Tiu revuo, kiu estis konsiderata kiel „lumturo“ de la Esperanto-movado, probable sukcese kaj longdaŭre influis la bildon pri Ĉinio ĉe la sennombraj legantoj, kiuj abonis ĝin, admiris la kolorajn bildojn en la revuo kaj supozeble ankaŭ kredis, kio estis tie skribita, sen tro zorgi pri la propaganda karaktero de la eldonaĵo. Nu, la revuo *„El Popola Ĉinio“* finfine utilis ankaŭ kiel ideala propagandilo de la Esperanto-movado mem, de kiu la fakto, ke ĝi aperas en la internacia lingvo, evidente estis pli alte taksata, ol ĝia dubinda enhavo mem, kiun ĝi disvastigis.

La *Unesko-Kuriero* en Esperanto do iusence transprenis la (duan) rolon, kiun iam ludis *„El Popola Ĉinio“*, nome montri, ke Esperanto ekzistas, eĉ kun pli altnivela aŭspicia prestiĝo. Ĉi tiu sukceso principe estas enorma, sed en la nuntempa mondo, en kiu la Esperanto-movado estas konsiderinde malfortigata, ĝi ne plu trovas sufiĉajn aprezon kaj atenton de la esperantistaro, kiu indiferente rilatas al la projekto. Alian signifon ol propagandi Esperanton ĝi fakte ne havas, ĉar por la klerigo de la esperantistoj ĝi apenaŭ gravas. Kiom da esperantistoj reale legas la kurieron *en Esperanto*, kiu estas elŝutebla en la reto,[16] estas nekonate kaj ludas neniun rolon. La revuo de Unesko fakte estas nekutima eldonaĵo, kiu dediĉas siajn numerojn al

---

[12] Vd. https://www.derbund.ch/articles/articles/14282316.
[13] Vd. https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=6541.
[14] VD. https://eo.wikipedia.org/wiki/Unesko-Kuriero, https://sezonoj.ru/2019/11/unesko-14.
[15] Vd. http://www.espero.com.cn. Okulfrape estas, ke sur sia ĉefa paĝo ĝi havas reklambendojn kun ligoj al komplicaj (duon)oficialaj novaĵ-servoj de la Esperanto-movado kiel Libera Folio, edukado.net, ILEI, Eŭropa Esperanto-Unio, kiuj same senkritike rilatas al Ĉinio.
[16] Vd. https://uea.org/revuoj.

gravaj kulturaj kaj sociaj temoj kun la celo diskonigi la idealojn de Unesko speciale pri la dialogoj inter kulturoj kaj por lanĉi internaciajn debatojn, kiel oni povas legi en la ĉi-rilata paĝo de Vikipedio.[17] Iam tiu honorinda revuo estis tre aprezata en la mondo. Nun, kiam la ĉina registaro financas la *Unesko-Kurieron*, eĉ se temas nur pri la Esperanto-eldono, kiu ŝajnas esti nura tradukaĵo de la nacilingvaj originaloj, la situacio esence ŝanĝiĝis. En periodaĵo financata de la ĉina registaro oni ne povas atendi kritikajn artikolojn pri Ĉinio, ekzemple pri la situacio en Tibeto, Sinkiango aŭ Honkongo, kiuj tuŝas la interesojn de Pekino. Sub tiaj kondiĉoj ĉi tiu projekto riskas fariĝi pura farso, kiu groteske renversas la intencojn de la organizaĵo, kaj la revuo mem riskas fariĝi ostaĝo de Pekino, kiu probable povas esti certa, ke en la *Unesko-Kuriero* ne aperas kritikaj artikoloj pri Ĉinio.

Ŝajnas, ke tiuj problemoj tute ne ĝenas la esperantistojn. Male, ili multe ĝojas kaj fieras, ke la *Unesko-Kuriero* aperas en Esperanto, tutegale sub kies ŝtata kontrolo aŭ influo tio okazas. La (naiva) prezentanto de la afero sub https://uea.facila.org/artikoloj/tra-la-reto/unesko-kuriero-en-esperanto eĉ trovas „bona novaĵo“, ke la *Unesko-Kuriero* estas eldonata de la novaĵ-agentejo *„El Popola Ĉinio“*, kio „signifas, ke la esperanta eldono estas financata de la ĉina registaro“.[18] Fakte, la Esperanto-movado ĉiam ĝojis, se iu registaro finance apogis iun esperantan projekton, sendepende de la demando pri kia registaro temas kaj ĉu temas pri ŝtata propagando.[19] Tiel en la Esperanto-movado oni komprenis sian neŭtralecon, kiu fakte servis al ĝi kiel nura fasado, same kiel la palavro pri paco kaj homaj rajtoj. En komunismaj kaj alispecaj diktatoraj landoj, kie la Landaj Asocioj de UEA estis integra parto de la politika sistemo, la esperantista mondorganizaĵo neniam plendis pri la lezado de la homaj rajtoj. Estas klare, ke sub tiaj premisoj la politika neŭtraleco de la Esperanto-movado, kiu en si mem ne estas homrajta nek klasika pacifisma organizaĵo, kvankam ĝi kelkfoje kondutas tiel tia, estis pura parodio, kiu kondukis tiun politikon al la plena absurdo. Multaj gvidaj pintuloj de la Esperanto-movado, inter kiuj troviĝis/as ne malmultaj komunistoj kaj kripto-komunistoj, evidente komplete fajfis pri neŭtraleco kaj homaj rajtoj, ĉar ili faris la sperton, ke Esperanto ŝajne pli prosperas en totalisma diktaturo ol sub la kondiĉoj de la libera demokratio, kiu evidente malmulte interesiĝas pri Espe-ranto. Sed la ŝtata intereso pri Esperanto en la plej lastaj komunismaj bastionoj Ĉinio, Vjetnamio kaj Kubo, kie intertempe la kapitalisma ekonomio mem venkis, ne estu supertaksata. En tiuj landoj Esperanto estas komplete marĝena mikro-socia afero, flegata de tre malmultaj aktivuloj kompare kun la giganta makro-lo-ĝantaro, kaj minacata de la plena malapero.

En Esperanto-medioj oni eĉ aŭdis aŭ legis pri la intenco baldaŭ okazigi novan Universalan Kongreson de UEA en Ĉinio. Tio do estus jam la tria fojo post la jaroj 1986 kaj 2004, kiam tiu kongreso okazis en Pekino. Ideala okazo por propagandi la ĉinan „kulturon“! Impreson donas la revuo *Esperanto* (UEA), kiu estas jam plene konkerita de la ĉina propagando laŭ la stilo de la iama *„El Popola Ĉinio“*.[20] Sed kiel dirite, la Esperanto-movado ne interesiĝas pri politiko kaj ankaŭ ne kritikas la staton de la homaj rajtoj en la lando, kie ĝi kongresas. Do, ĝi tutcerte ne faros tion estonte ankaŭ en Ĉinio. La Esperanto-movado verŝajne ne ŝanĝos tiun *pragmatan* praktikon ĝis la fino de sia ekzisto, eĉ se la brutalaj politikaj reĝimoj, kiuj favoras la Esperanto-movadon, inkluzive Ĉinion, daŭrigas lezadi la homajn rajtojn. Ankaŭ tio ne interesas la Esperanto-movadon, kiu ne povas ŝanĝi la malbonojn de la mondo. La esperantistoj kredas la iluzion, ke la mondo pliboniĝos pere de la enkonduko de la neŭtrala lingvo Esperanto, kaj ili daŭre okupiĝos nur pri tiu iluzio.

Ĉu tia kritika komento povus aperi en la *Unesko-Kuriero*, aŭ ĉe *„El Popola Ĉinio“* ? Sub la kondiĉoj de la ĉinaj kontrolo kaj cenzuro tio estus apenaŭ imagebla! Ĉar ankaŭ Esperanto-revuoj, kiuj kutime fanfaronas nur pri propraj sukcesoj, mem ne aparte ŝatas publikigi tiajn artikolojn, tial ili devas aperi – aŭ prefere aperu – en la libera interreto, kiu feliĉe ekzistas ekster la cenzurata gazetaro.

Andreas Künzli, dec. 2019

[17] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Unesko#Unesko-Kuriero; https://eo.wikipedia.org/wiki/Unesko-Kuriero
[18] Vd. ankaŭ https://sezonoj.ru/2020/01/chinio-4.
[19] Siatempe ankaŭ en okcidenta Germanio (FRG) aperis ŝtata propagandaĵo en Esperanto, kiu kolerigis la GDR-anojn.
[20] Vd. ekzemple n-ron 1/2020.

© Prilaborita de A. Künzli, Svislando. Originale verkita en Esperanto kaj publikigita sur www.planlingvoj.ch en decembro 2019. La aŭtoro (nask. 1962 en Svislando) studis slavan filologion, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato kaj finis siajn studojn en 1992 per la akademia grado lic. phil. (M.A.), Esperantisto de 1979.

Aldono 2020:

Chinese Government Poses Global Threat to Human Rights
https://www.hrw.org/news/2020/01/14/chinese-government-poses-global-threat-human-rights

Pli fruaj artikoloj de A. Künzli pri similaj temoj:

70-jariĝo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj: Plej granda krizo de la Homaj Rajtoj post 1945. pdf (3 p. A4)
http://www.planlingvoj.ch/Homaj_rajtoj_2018.pdf

La Esperanto-movado plene kapitulacis antaŭ la Homaj Rajtoj pdf (6 p. A4)
http://www.planlingvoj.ch/Esperanto_movado_kaj_homaj_rajtoj.pdf

Homaj rajtoj sub premo! (situacio en 2016) pdf (6 p. A4)
http://www.planlingvoj.ch/Homajrajtoj_2016.pdf

Homaj rajtoj 2014/15: Internacia superrigardo pdf (38 p. A4)
http://www.planlingvoj.ch/Homaj_rajtoj_2014-15.pdf

Homaj rajtoj en Vjetnamio pdf (27 p. A4)
http://www.planlingvoj.ch/Vjetnamio_Homajrajtoj.pdf

Aldonaĵo:

Komento pri:

https://sezonoj.ru/2020/02/chinio-5/

Ĉi tiu skribaĵo ŝajnas al mi falsa hipokritaĵo.

Kiel oni povis legi aŭ aŭdis, la ĉinaj registaraj instancoj menciitaj de la UEA-prezidanto en la komenco de la epidemio ĝuste klopodis eviti la diskonigon de la fakto, ke tiu viruso aŭ epidemio ekzistas kaj ke ĝi estas tiel danĝera, kaj prisilentis la tutan aferon, aŭ la lokaj instancoj ne sufiĉe frue anoncis ĝin al Pekino.

Ankaŭ tiu ekzemplo montras, ke Ĉinio prisilentas ĉiujn gravajn problemojn tiel longe, ke ili ne plu estas prisilenteblaj, kaj la popolo restas neinformita pri gravaj problemoj. Estas konate, ke la komunisma partio, kiu konstante laŭdas sin mem, brile "sukcesas" subpremi ĉiujn opoziciajn strebojn kaj voĉojn en la lando, sed mizere fiaskas se temas pri kontraŭbatalado aŭ evitado de tia epidemio.

Pro tio oni devas konsideri la skribaĵon de Charters pura pugolekado al al adreso de la ĉina registaro, de kiu li verŝajne esperas apogon de Esperanto. Prefere oni skribu nenion. Sed tiuj esperantistoj neniam lernas el farata kritiko. Ankaŭ Charters estas brila ekzemplo de tiu speco.

Oni devas ankaŭ mallaŭdi La Ondon, ke ĝi publikigas tian fatrason (sen komento).

www.planlingvoj.ch, feb. 20